
HEJS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:
F-INO ITZIAR ARTECHE

Nro. 79 - 1972

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



**Al ĉiuj membroj kaj legantoj ni deziras**

**FELIĈAJN KRISNASKOFESTOJN kaj SUKCESPLENAN NOVJARON 1973ª**

# ENHAVO



Enhavo ........................1
Notoj ........................1-3-9
La junuloj ...................2-3
Ĉi nokte .....................4
Kristnasko ,..................5
Niaj festoj ..................6
Mia blonda filo ..............7-8
Esperantistaj familioj.....9
Justeco estas... .......10-11
Humora angulo ..............11
Koresponda Servo............12

\- - - - - - - - - - - -

NOTO: La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigi taj ne reprezentas la oficialan opinion de HEJS, escepte en okazo de oficiala Komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktorino; do , pri la artikoloj respondecas la aùtoroj mem.

---

A T E N T U !!.- POR KE NIA REVUO " H E J S " ESTU VERA, JUNA, NACIA REVUO, NI ATENDAS DE VI ĈIUJ KUNLABORON PERE DE ARTIKOLOJ, RAPORTAJOJ,KTP.

NI ESPERAS ILIN !!!!

D A N K O N !!!!!

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

ESPERANTO

# La junuloj



Kiel estas la hodiaúaj junuloj ? . Estas demando kiu ni nin faras multfoje.

La vorto "juna" estas preskaù ĉiam en rilato de vortoj kiel libereco, antaùjuĝoj, konformiĝo , viski-kluboj, drogoj, kiuj faras nin pripensi la problemojn, kiujn ni havas planitaj.

La junuloj amas la liberecon, ni ne havas antaùjuĝojn, tio-ĉi volas diri, ke niaj agoj, kiam nia konscienco ilin aprovas, ni realigas ilin, atentante tre malmulte la opinion de la aliuloj.

Libereco; vorto, kiun ni petas malespere. Nia moderna muziko montras al ni en la kanzonoj, la pli multo el ili kun mesaĝo. Kanzonoj, kiuj parolas pri libereco, justeco, amo, militoj, ktp.. Ĉi-tio volas diri, ke ni luktas pro niaj idealoj, por ke niaj ideoj estu aùdataj de la aliaj.

Sed, kio okazas ?. Ni estas en etapo, kiam la socio nin envolvas kaj trenas, la antaùjuĝoj de niaj antaùuloj nin ĝenas, la mono, marionete transformas nin, kiuj dancas je la sono pli intera al ni, la strukturoj nin konvertas en programitaj maŝinoj por determinita laboro.

Cio ĉi produktas ĉe ni ĥaoson. Ŝajnas ke la mondo furiozas kontraú ni. Tiam, kiam ĉi-tio okazas, ni reagas antaù la faktoj kaj tiam naskiĝas la "hipioj" kiuj diras, ke ili luktas pro idealoj, sed, ĉu luk-

tas pro kaŭzo donante la dorson sen interisiĝi el ĉio ?, ĉi momente estas kiam aperas la viski-kluboj kaj drogoj, iloj por elgliliĝi, kiuj faras ke niaj mensoj ne afrontu la veron, kaj intencas ke ni ne zorgu niajn problemojn.

Resume, la junuloj estas dividitaj en du grupoj: unu grupo konscias ke ili luktas pro siaj idealoj ; junuloj kiuj celas kompreni sin kaj la ceterajn. Kaj la dua grupo, juan amaso indiferenta, laca, enua, kiu portas longan hararon, ĉar ili diras " estas laŭ mode ", egale ke morgaŭ alportus la kapon razita se la modo ŝanĝiĝus. Junuloj kaj junulinoj iras kune, ĉar ili diras ke estas tre beleta, sen halti por pensi, ke la rilatoj inter viro-virino estas pli profundaj ke simpla ligo aŭ seksa kontentigo.

Se la junuloj, individue volas lukti pro unu celo, estas kiam ni nin sentas solaj kaj malkuraĝaj. Sed, se ni kuniĝas ĉiuj kaj luktas por atingi la saman celon, estas kiam ni fortiĝas. Kaj se estas grupo, kiu luktas kune ni jam atingis ion, kiu reefikas en nia bono kaj en la bono de la aliaj.

JOSE CARLOS QUINTAS-(Vigo)

= = = = = = = = = = = = =

Jen la nomo de la nova delegito por la gejunuloj por Sabadell.

JOAN RAMONEDA CANET

ADRESO : Centro de Esperanto Sabadell
Apartado, 407

S A B A D E L L

- - - - - - - - - - - - - - - - -

**Noto: Nia redaktorino Mª Carmen Navarro naskis beletan infaninon. Niajn gratulojn al la feliĉaj gepatroj.**

ĈI NOKTE SONĜIS

SONĜON MI....



Ĉi nokte sonĝis sonĝon mi,
Ho, ke ĝi estu ver':
Ke regas ne milito plu,
Sed paco ĉie sur ter' .

Pri konferenco sonĝis mi,
Ŝtatestra grandkunven' .
Konfirmis dokumenton ĝi
Per la subskribo jen :

Ne plu ekzistas militist',
Ne plu la armilan' .
Nun ĉiu estu pacifist'
Por l'bono de l'homar' .



Kaj sur la stratoj ĝoja kri'
Eksonas ĉie nun :
Por tuthomara famili'
Nun ĉie brilas sun' !

Ĉi nokte sonĝis sonĝon mi /
Ho, ke ĝi estu ver' : /
Ke regas ne milito plu / bis
Sed paco ĉie sur ter' ! /

<u>Kai L.Henriksen</u>

<u>el Danlando</u>

NOTO: Pro manko de spaco ni ne povas publikigi la muziknotojn, sed ĉiu interesanto povos peti ĝin rekte al la adreso de HEJS.

# KRISTNASKO

Mi sentas ĉi nokte la kristnaskan malvarmon,
kaj aŭdas monotonraŭkan tamburinvibradon,
ankaŭ kanton de junuloj pasantaj pretere,
la ŝtonpaviman eĥon far legom-ĉar',konkrete,
kaj bruon de veturiloj trenataj ĉevale,
kiuj sin direktas al la bazaro knare.

Ĉe mi,en la kuirej', proksime al la hejta varmo,
kokaĵon oni pretigis sur ardaj gasaj flamoj.
Dum esperante ili la morgaŭon plukas plumojn,
mi rigardadas ĉielen la ŝajnan plenan lunon.

Morgaŭ,tagmanĝante, malriĉecon nian forgesos ni;
rigardos nin ĉe deserto Jesu' ja naskiĝinta,
kaj post amplena trarigardo milda, ekploros li.

Joan SALVAT-PAPASSEIT - Libere elkatalunigis:
Petro Nuez.

Joan SALVAT-PAPASSEIT, katalunlingva poeto, renovigis la formojn, la temojn kaj la ideojn de siatempa poezio. Aŭtodidakto, li devis labori en multdiversaj metioj. Lia verkado enkondukis la avangardismon kaj la poezion pri la malriĉeco. Ekzemplo pri la lasta estas la ĉi-supra NADAL - Kristnasko. Li ĉiam alfrontis siatempan socion, kaj maltrankviliĝis pro la sociaj, politikaj, naciaj kaj religiaj problemoj. Li naskiĝis en Barcelono je 1894, kaj mortis pro tuberkulozo je 1924 en la sama urbo. Oni eldonis kompletan verkaron lian ("POESIES", Editorial Ariel, Barcelona1962).

Liajn verkojn oni tradukis en diversajn lingvojn hispane (ANTOLOGIA POETICA DE LA LENGUA CATALANA,F,Ros Editora Nacional, Madrid 1965) (Joan Salvat-Papasseit "ANTOLOGIA" J.Batlló,El Bardo, Barcelona, 1972. Du - lingva); portugale, france, germane, nederlande, itale kaj rumane. RIKARDO SEKALL

& & & & & & & & & & & & & & & &

# ZAMENHOFAJ TAGOJ

Gajaj kaj homplenaj estis tiu-ĉi jaro la memorfestoj pri Zamenhof en la Bilbao'a Grupo.



La plej grava deziro de la estraro konsistis en kunigi la membrojn kaj simpatiantojn per ĝojplenaj kunvenoj anstataŭ pezigi ilin per troaj seriozaj paroladoj. Tamen, la organizantoj ne lasis flanke la rememoron pri la majstro kaj elpensinto de la plej taŭga komunikilo inter homoj.

La 15an.; vendredo, post kelke da vortoj rilate al la vivo de Zamenhof la ĉeestantoj ĝuis vespermanĝon animplenan kaj ĝojan, kaj oni povis aŭdi sufiĉe da konversacioj esperante parolataj.

Sabaton ; "Polifónica Euskalduna" plezurigis nin kiel ĉiujare per sia bonege ludata muziko kaj finiĝis la spektaklo per la Esperanta Himno.

Dimanĉon; post la Meso en Esperanto ni kuniĝis en nia salono por aŭskulti la muzikan grupon "Los Chiquis" kaj la pianiston Leoncio García, kaj ni gustumis ankaŭ abundan aperitivon. Poste ni celebris la tradician tagmanĝon.

Eble la plej grava afero konsistis en la prelego fare de Pastro Narciso Irala, la mondfama prelegisto, antikva esperantisto, kiu glosis per taŭgaj vortoj la gravecon de Esperanto je la estonta homara vivo.

PETRO

# MIA BLONDA FILO



Mi jam legis, ke la koloroj es-
tas ofte influaj en la vivo de la ho
moj. Eble tio jam estas vero, sed mi
ĝin ne rimarkis pro la fakto, ke mi
ne havas elektitan aŭ preferitan ko-
loron.

**Tamen**, en nia familio estas koloro kiun mi ne
elektis kaj kiu estas ege influa en nia ĉiutaga vivo.
Mi priparolas la blondan hararon de mia filo.

Sendube ĉi tio estas nenia novaĵo, ĉar ja mi ne
scias pri gepatroj, kiuj "mendis" la idojn kun tiu
aŭ alia harara koloro, (eble en la estonteco kiam
ni progresos iomete pli, ĝi estos realigebla) kiu
kuraĝas diri ne ?.

La fakto estas, ke mia malgranda filo, laŭ ĝene
rala opinio pri koloroj estas blonda, kaj ni, tio
estas la resto de la familio, estas brunaj.

La harara koloro de mia filo, pri kio li ne kul
pas kaj mi ankaŭ ne, aŭ, ĉu mi jes ?, multe influas
en la rilatoj kun miaj geamikoj kaj personoj kun
kuij ni konatiĝas.

Vi jam scias kio okazas kiam vi vizitas geamikojn
aŭ familianojn, oni ne scias pri kio paroli. Post in
formado pri la sanstato de la familianoj aŭ konatu-
loj, alvenas la vico de la vetero. Ankaŭ vi jam sci
as, ke la vetero neniam, samtempe, kontentigas ĉiun
homon. Jen pro kio la konversacio pri ĉi tiu temo
estas pli daŭra, tamen ĝi ankaŭ finiGas, post kio an
gora silento regas la kunvenantojn.

Nu, jen la momento de mia filo; jes, jen la mo


mento de mia filo. Ĉiam estas iu kiu konstatas, ke la hararo lia estas blonda, kaj tuj li rimarkiĝas - sed rigardu ĉi tiun belan infanon kiom blondaj estas liaj haroj, kontraste kun la resto de la familio, kiu havas ilin brunajn -. Kompreneble ni ĉiuj ridetas kaj la konversacio reviglîĝas. Ankaŭ estas ĉiam iu kiu demandas al mi, kial li estas blonda ?, alia pli spritema informiĝas, ĉu la strata noktgardisto estas blonda ?. Ĉi tiuj demandoj daŭrigas la ridetadon kaj interparoladon. Ofte estas ankaŭ iu, kiu internaciigas la aferon kaj demandas, ĉu li estas germana?. ĉi tiu lasta sugesto komplezas min, ĉar mi estas konvinkita eŭropeano, kvankam, tio jes, mi ne scias el kia koloro estos la hararo de la nova eŭropeano. Mi esperas, ke ĝi ne estos problemo por la unuiĝo de Eŭropo.

Mi konstante ne povas rideti, ĉar mi devas klarigi, ke mia avino estis blonda, kaj ĉar ni ne heridis monon el ŝi, eble mia filo heridis la koloron de ŝia hararo. Kio ankaŭ estas dankinda.

La konkludo estas, ke la hararo de mia filo agrabligis la amikecan rondon kaj ĉiu homo sin sentis feliĉa. Nepras aldoni, ke ili ĉiam parolis bonintence.

LUIS SERRANO PEREZ
( SABADELL )





$ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $

S P R I T A Ĵ O --

- Foje, kiam mi unue min banis estinte infanino, rakontas grasa maljunulino, mi memoras ke ĝi impresis min terurege.
- Kompreneble, sed jam la dua fojo .....
La dua fojo mi ne scias kio okazos al mi

= = = = = = = = = = = = = =





# ESPERANTISTAJ FAMILIOJ

Tiu ĉi jaro festas la 50an datrevenon kiel esperantista vivo sinjorino Karolino Minnaja, edzino de sinjoro Luigi Minnaja. Sinjorino Minnaja eklernis esperanton la jaron 1922 kiam ŝi estis dek ok jara knabino.

Baldaŭ ŝi entuziasmiĝis pri la internacia lingvo kaj komencis labori tutplene, diskonigante ĝin, klarigante kursojn, verkante artikolojn ktp. . En 1.933 ŝi konis esperantiston, Luigi Minnaja ĉe Venecia kaj ili laboris kune por disponigi la XXVIIan I. K. de E. ( Romo 1.935 ).

Kiel frukto de tiu ĉi interrilatiĝo ekflamis la amo reciproka kaj ili geedziĝis en 1937, daŭrigante ilian klopodon por la disvastigo de la esperanta lingvo. Hodiaŭ, ili laboradas kiel antaŭe, kaj ni povas legi artikolojn kaj poeziaĵojn de Luigi Minnaja en " **Katolika Sento** ". Li dediĉas al sia edzino tiu ĉi jaro en ŝia Ora Jubileo poezion :



....Edzino kaj patrino saĝmodela

l'esperan lingvon vi al la infanoj

instruis kun l'itala paralela....

Efektive, iliaj filoj Nikolo kaj Karlo lernis esperanton jam de la naskiĝo. Ni sendas nian gratulon al la geedzoj kaj speciale al sinjorino Karolino Minnaja pro ŝia Ora Jubileo kun la esperanto.

Sro.Minnaja parolas ĉiudimanĉe per la radio de Romo. Ondoj 30'90m, 41'24 kaj 50'08 je la 21ª horo ĝis la 21ª kaj 10 minutoj.

MIAU

= = = = = = = = = = = = = = = = = =

POR FLUE PAROLI ESPERANTON KAJ PLIALTIGI LA PAROL NIVELON, NE FORGESU LEGI ĈIAM ION ESPERANTE !!!



# JUSTECO ESTAS......

....Ke oni povu ĝui je plena esprimlibereco kiu ne malutilu la komunan bonon.

....Ke neniu estu loĝante en domaĉoj aŭ mizeraj loĝejoj, dum aliaj loĝas en luksaj domoj aŭ amuzaj bienoj.

....Ke neniu homo mortu pro malsato dum aliaj "naĝas" en sateco.

....Ke la homoj ne estu devigataj migri, forlasi siajn familiojn, urbon aŭ landon ktp. viktimoj de la ekonomia mekanismo de la oferto kaj mendo.

....Ke ne ekzistu tiom da neegaleco inter regionoj, kiu faras ke iuj estu riĉa centro kaj aliaj "loĝejo" de malriĉeco.

....Ke oni perdiĝu neniu inteligento, kvankam ĝi devenu el la plej humila klaso kaj ke la senpaga instruado estu tuta kaj definitiva.

....Ke ne estu taglaboroj tiel ege longaj (eksterordinaraj horoj ktp.) kontraŭ ege mallongaj salajroj por zorgi la familiajn bezonojn.

....Ke neniu homo estu diskriminaciata pro kia ajn kaŭzo; rasa, devena, seksa, politika, religia...ktp .

....Ke ni ne nomu la aliajn maljustaj kaj forgesi ke ankaŭ ni estas agentoj de maljusteco kaj ne nur viktimoj.

....Ke ĉiu homo havu atingeblecon al inda labor-loko, kiu alportu al li sufiĉan salajron.

....Ke ne ekzistu laborista senlaboreco.

....Ke ne ekzistu tiom da neegaleco inter la homoj.

Ĉio ĉi kaj multaj aĵoj pli estas.......JUSTECO .

MARI-JOSE

= = = = = = = = = = =

HUMORA

ANGULO ....



"POLITIKO"

Dum la celebrado de politika mitingo en Gales, unu el la parolantoj estis interrompita de la opoziantoj, kiuj, ne kontentaj, ekĵetis al li legomojn . Unu el la plej furiozaj atakantoj, ĵetis al li hufoferon kiu feliĉe ne trafis lin.

Kiam la oratoro vidis la ĵetitan objekton, li diris laŭte : -"Mi petas la entuziasman ĉeestanton kiu ĵetis al mi lian ŝuon, ke li bonvolu veni repreni ĝin".

- (El Correo Español El Pueblo Vasco 8-9-72 ) -



# DEZIRAS KORESPONDI:

---LESKU MIHÁLY, lernanto de kvina klaso, kun lernantino de kvina klaso. Lia adreso :



HUNGARIO , KOMLÓ

SPORTVÖLGY KILENA

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

---HELENA VIESNEROVÁ 16 jara gimnazia studentino, kun hispana knabo aŭ knabino, ŝi kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn. Ŝia adreso :




CHOTĚVICE 234 dist. TRUTNOV

ĈEĤOSLOVAKIO

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

---JESUS PEREZ . Li estas 27 jara kaj kolektas bildkartojn. Lia adreso :

Str. Tomás Miller 54, 2º

LAS PALMAS DE GRAN CANARIA - (HISPANIO)

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

AMIKECO

TRA LA LETEROJ



